

Esperanto-vivo en Japanio

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 599/94-1, 1982 julio 08 kaj 10.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-94/SRI-1982-94-2-601-Claude-kaj-Andree-GACOND-Esperanto-vivo-en-Japanio.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la somero ĉiuj ŝatas ferii. Ĉar ni mem, ne povas ferii en tiu ĉi periodo, kiu estas por la Kultura Centro Esperantista, kiun ni gvidas en la urbo La Chaux-de-Fonds, la periodo de plej granda aktiveco, ni alimaniere ferios. Ni migrados kun vi de lando al lando dum kelkaj semajnoj, raportante pri esperanto-aktivecoj, kiujn oni devas koni, tio helpe de revu-artikoloj, kiuj altiris nian atenton.

A.- Hodiaŭ ni estos en Japanio.

Cl.- Ĉiujare la Esperanto-Domo en Tokio organizas Tutlandan Kunloĝadon, kaj ni ĵus ricevis raporton pri la lasta, kiu okazis de la 1-a ĝis la 5-a de majo en la urbo Yaizu, se ni ne eraras.

A.- Estas fakte al ni iom malfacile akiri tre precizan superrigardon pri tiu ĉi aranĝo, ĉar la plimulto de la raportoj kaj sciigoj estas krokodile donitaj, tio estas por tiu okazaĵo en la japana.

Cl.- Jen el la esperanta parteto kelkajn citaĵojn ni faras:

A.- La 15-a Tutlanda Kunloĝado de Esperantistoj, organizita de Esperanto-Domo en Tokio kaj morale aŭspiciita de Japana Esperanto-Instituto, okazis inter la 1-a kaj 5-a de majo 1982, en la Junulara Domo en urbo Yaizu, situanta meze de Japanio.

Cl.- Ĝin efektive partoprenis 122 el 142 aliĝintoj, nome, 77 viroj kaj 45 virinoj, kies jaraĝoj variis de 5 ĝis 76 jaroj, meze ĉirkaŭ 31 jaroj.

A.- Kio estas kunloĝado?

Cl.- En Japanio populare estas "kunloĝado", laŭ la senco, ke loĝante komune en unu domo oni plenumas intensive iun komunan taskon, ekzemple studi, diskuti, ekzerci, ludi, aŭ fari ion. Ankaŭ en esperantio praktikataj estas diversspecaj kaj diversskalaj kunloĝadoj.

A.- Ĉefaj efikoj de "kunloĝado" estas jenaj;

Cl.- 1) Komuna loĝado ebligas profunde konatiĝi reciproke. Precipe en nunaj eaperanto-kunloĝadoj, en kiuj varias partoprenantoj je jaraĝo, profesio, loĝloko, intereso, ktp., tiu konatiĝo vastigas la mondon de unuopaj partoprenantoj.

A.- 2) Komuna loĝado ebligas plenumi kvante kaj kvalite intensan aktivecon bone celitan.

Cl.- Tiel "kunloĝado" estas esence sama kun kutima IJK.

A.- Eble sub la mallongigo IJK la raportanto volas diri Instituta Jar-Kunveno, sed pri tio ni ne estas certaj, kaj tiu ĉi frazo estas pro tio al ni nebula. Ĝi plian fojon montras, ke en esperantio oni troigas la uzon de mallongigoj, verŝajne pro paper-ŝparo kaj emo ĵongli kun iom fermita lingvaĵo. Sed ni revenu al nia raporto el Japanio :

Cl.- "Kunloĝado estas esence sama kun kutima IJK kaj aliaj aranĝoj en diversaj landoj, sed se estus ia speciala karakterizo en japanaj, tio estus pro intenseco de programo aŭ pro povo de japanoj koncentri sin sur iun celon.

A.- Kia estis la 15-a Tutlanda Kunloĝado de Esperantistoj?

Cl.- Principa programo de unu tago, de ellitiĝo je la sesa horo 30 ĝis enlitiĝo je la 22-a (pro reguloj de la domo), estis la jena :

A.- Antaŭtagmeze 3-hora leciono; posttagmeze fakaj kunsidoj kaj 2-hora leciono; vespere diskuto aŭ kantado kaj poste 2-hora komuna programo.

Cl.- Dum la tuta kunloĝado, entute 4 noktoj kaj tri tagoj kaj duono, oni lernis 17 horojn, kio egalas al 2 monatoj en kutima semajna kurso.

A.- Lingvo-lernado okazis en 12 laŭgradaj klasoj sub gvidado de amatoraj sed jam lertaj gvidantoj.

Cl.- Kaj sekvas tuta listo da nomoj, kiujn ni saltas.

A.- Aparte estis Infana Klaso, en kiu 8 infanoj, de 5 ĝis 10 jaroj, ĝuis lerni kaj ludi sub la varma zorgo de s-roj Yamakawa Itiya kaj Iwanaga Kazuro.

Cl.- Posttagmeza leciono de 4 altnivelaj klasoj estis komuna seminarieto "Kial nun ni lernas esperanton?" en la formo de publika diskuto prezidata de s-ino Kikusima Kazuko. En ĝi gvidantoj de la koncernaj klasoj kaj s-roj Ulrich Lins kaj Nagase Yosikatu rolis kiel esperantistoj kaj ĉirkaŭ 25 lernantoj kiel neesperantistoj atakemaj per akraj demandoj.

A.- Fakaj kunsidoj grupigis studentojn, veteranojn de la vivo, tajpil-manipulantojn komputeristojn, koruson, eldonistojn, gepatrojn kaj gefilojn, edukistojn kaj interpretistojn.

Cl.- La diskuto en esperanto elektis la ĉiĵaran temon de la Universala Kongreso; "Generaciaj aspektoj de la esperanto-movado" kaj grupigis ĉirkaŭ 25 ĉeestantojn.

A.- Fakte pri tiu ĉi diskuto aperas aparta raporto, kiun ni ne povas citi.

Cl.- La vesperaj programoj estis variaj. La unuan vesperon, post alveno de ĉartita aŭtobuso el Tokio, oni havis Interkonan Vesperon.

A.- La dua vespero estis por prelegoj. S-ro Yamasaki Motohiro, vicprofesoro pri matematiko en la Universitato de Sinyau, helpis kompletigi parolpovon per "matematikaj esprimoj en esperanto", poste s-ro Ulrich Lins el Okcidenta Germanio, japanologo, prilumis la esperanto-movadon japanan kaj eŭropan parolante pri la aspektoj similaj kaj kontrastaj, kun interpreto de s-ro Goto Hitosi. Fine, per enigma titolo "esperanto - lernaĵo, ludilo, lingvo" s-ro Yamakawa Syuiti, interpretisto inter la angla kaj la japana, analizis sintenojn al esperanto de japanaj esperantistoj. Laŭ li por naŭdek procentoj el ili esperanto estas lernaĵo. Ili ŝatas lerni kaj ne celas ellerni. Aliflanke por 9 procentoj esperanto estas ludilo kaj nur unu procento havas veran konscion ke esperanto estas lingvo, kaj celas uzi ĝin kiel komunikilon.

Cl.- La tria vespero estis aranĝita kiel libera vespero. Junaj dancemuloj aranĝis diskotekon.

A.- La lasta vespero estis gaja vespero, kulmino de distra dimensio de la granda Kunloĝado. En ĝi anoj de du-tri dormoĉambroj, ĉijare laŭgeneracie aranĝitaj, grupiĝis kaj prezentis ion per si preparitan. Mirinde talentaj estis ĉiuj partoprenintoj! Kvankam oni apenaŭ havis tempon por preparo, ĉiuj prezentaĵoj, precipe skeĉoj, treege amuzis ĉiujn ĉeestantojn. Poste, lastvespera babilado daŭris eĉ ĝis la 6-a horo matene.

Cl.- La 5-an de majo oni havis fermon. En ĝi la saluto de la estro de la Junulara Domo, akcentanta neceson de lingvo internacia, estis kvazaŭ nia kutima parolo al neesperantistoj. Ni respondis per aplaŭdego kaj donacis esperantajn librojn al la domo, konklude - diras la raportisto.

A.- Kaj li aldonas, ke alia specialaĵo en ĉijara kunloĝado estis prezentiĝo en televida programero kaj ke 9 volontuloj kunlabore organizis la tutan aranĝon.

Cl.- Multo estus ankoraŭ raportinda. Per tiu ĉi salto al Japanio ni deziris nur veki vian intereson por la esperanto-vivo en lando, kiun malmultaj vizitas, kaj kiu pro tio sentas sin iom apartigita de esperantio.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo!